(Pri kio estas latitudo kaj longitudo Alicio havis nenian ideon, sed nur elparoli tiajn belege majestajn vortojn kvazaŭ donis al ŝi agrablajn sentojn.)

Post ne longe ŝi rekomencis :—" Eble mi trafalos tra la tuta terglobo ! kaj estos tre, tre strange elfali inter la homoj kiuj marŝas kap-malsupre ! mi kredas ke oni nomas ilin la *Antipatioj*." (Ĉe eksono de tiu strangaĵo ŝi certe *ne* sopiris aŭskultantojn) ; " mi ja devos demandi al ili en kiun landon mi enfalis, dirante " Bonvolu, Sinjorino, diri al mi ĉu tiu ĉi lando estas Nov-Zelando aŭ Aŭstralio ? " (Ŝi penis klinsaluti ! Imagu al vi, karaj legantoj, kiel oni povus klin-saluti falante tra l' aero. Ĉu *vi* povus tion fari ?) " Sed ŝi nepre nomus min malklera bubino. Do, nur malutilus demandi tion ! Pli bone estus serĉi la nomon ie sur la muroj surskribitan."

Malsupren, ankoraŭ malsupren ! Krom babili ja estis nenio por fari, sekve Alicio baldaŭ denove ekparolis : " Hodiaŭ vespere *Dajna* tre sopiros min. (*Dajna* estas ŝia kato.) Mi esperas ke ĉe la temanĝo oni ne forgesos ŝian subtason da lakto. " *Dajna*, vi karul', ho se vi nur estus tie ĉi kun mi ! Ne estas musoj en la aero, sed vesperton vi eble povus kapti, kaj vesperto ja tre similas al muso. Sed ĉu katoj manĝas vespertojn ? " Alicio okaze nun fariĝis dormema, kaj dorme ripetadis :—" Ĉu



katoj manĝas vespertojn ? Ĉu katoj manĝas vespertojn ? " kaj iafoje ŝi ĉuis anstataŭe " Ĉu katojn manĝas vespertoj ? " (Ĉar ŝi kapablis respondi nek unu nek alian el la du demandoj, ne tre grave estis kiun " ĉuon " ŝi esprimis.) Ŝi sentis sin ekdormanta, kaj ĵus komencis sonĝi ke ŝi marŝas mano en mano kun *Dajna* kaj diras al ŝi tre solene :—" *Dajna*, vi diru al mi la veron ; ĉu iam vi manĝis vesperton ? " kiam (ho, la sur-prizego !) subite ŝi falis *plomp* ! sur amason da sekaj folioj. La falego efektive finiĝis !

Pro la folioj ŝi ricevis nenian vundon. Do, stariginte sin sur la piedojn ŝi rigardis supren. Super la kapo ĉio estis malluma, sed rekte antaŭ ŝi vidiĝis longa koridoro, kaj jen forkuras tra ĝi la Blanka Kuniklo. Ne perdinte eĉ unu momenton, Alicio rapide postsekvis kaj aŭdis ke ĝi diras, malaperante post murangulo, " se mi malfruos, ĉielo savu miajn orelojn ! "

En tiu momento ŝi estis preskaŭ apuda ; tamen, kiam ŝi preterpasis la angulon, la kuniklo jam malaperis. Kaj ŝi trovis sin sola en ia longa malalta halo lumigita per serio de lampoj kiuj pendas de la plafono. Ĉirkaŭ la halo estis pordoj ; sed ĉiuj estis fermitaj. Alicio do marŝis laŭ unu flanko kaj remarŝis laŭ la alia penante malfermi la pordojn ; sed ĉiu el ili estis ŝlosita, kaj Alicio malĝoje marŝis laŭ la mezo kaj de-mandis al si, ĉu ŝi jam neniam povos eliri la halon.

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEIN COLLECTION Octavo